



Svisa Esperanto-Societo

# informas

jaro 2011 numero 4-a: festa numero  
disdono je la 27-a de aŭgusto

## Gacond 80 !

### Omaĝoj



*Laboro por la bulteno ! (januaro 2004)*

# Rememorigilo

## *SES informas*

### Redakcio :

Claude Gacond, Chevreuils 14,  
CH-2300 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : gacond@bluewin.ch

Tel. : hejme : 032 926 52 32  
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Tiun festan numeron redaktis  
Richard kaj Martine Schneller

## *SES informas*

### Redaktaj datlimoj

**2011-5 : novembro-decembro :**  
oktobre 10, dissendo 1-an de novembro.

**2012-1 : januaro-februaro :**  
decembre 10, dissendo fine de decembro.

**2012-2 : marto-junio :**  
februare 10, dissendo 1-an de marto.

**2012-3 : marto-junio :**  
februare 10, dissendo 1-an de marto.

**Konsultu la retejon de SES !**

[www.svisa-esperanto-societo.ch](http://www.svisa-esperanto-societo.ch)

## SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue  
9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88 kaj  
079 69 709 66.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Arch-  
strasse 2, 8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.  
Retpoŝto : info@esperanto.ch

Stefano Keller, sekretario, CP 6034, 1002  
Lausanne. Tel. : 076 261 06 09. Retpoŝto :  
kellerstefano@gmail.com

Marie-Louise Mûnger, Rue Centrale 4, 2112  
Môtiers. Tel. : 032 861 26 28.  
Retpoŝto : ml.munger@bluewin.ch

Nelida Weidmann González, respondeca por  
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,  
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

Poŝta ĉekokonto :

17-581908-4


Svisa Esperanto-Societo  
2300 La Chaux-de-Fonds

## Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10.-	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20.-	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35.-	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50.-	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70.-	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25.-	nura abono al <i>SES informas</i>	

# Gacond 80 !



*(Fotis Andrée Gacond)*





# Luiza Carol

*Israela verkistino, kiu esperantistiĝis en 2005, tuj post kiam ŝi legis priesperantan artikolon de Claude Piron. Ŝi ĉeestis kvin kulturajn seminariojn organizitajn de CDELI kaj aliajn sviasajn esperantistajn eventojn. Ŝi estas ano de la Amikaro de CDELI.*



## Akrostiko

Centoj kaj centoj da libroj sur bretoj  
Laŭalfabete ekdormas.  
Antaŭ pordego, Adamo kaj Evo  
Unu l' alian rigardas.  
Dormas la urbo. Kaj jen, senprokraste,  
Evo eniras la domon.

Grincas ŝlosiloj en feraj seruroj,  
Akre ekblovas la vento,  
CDELI ĝemas samkiel grandarbo,  
Ordon forpelas serpento...  
Neniu venas malhelpi virinon  
De la bretar' preni libron.

\*

Centoj da miloj da paĝoj vekiĝas,  
Dancas literoj ĝojege...  
Esperridetas sur mur' Komenio,  
Lejbnico kaj Kartezio...  
Ina scivol' okazigas tumulton...

\*

Ekster la domo atendas Adamo  
Sentrankvilece, tremante...  
Pasas meznokto... kaj jen bela Evo  
Esperantece revenas !  
Raran trezoron ŝi tenas enmane !  
Antaŭ tre longe ŝi fidis serpenton...  
Ne fidis ŝi ĝin ĉi-foje.  
Turto konsilis al ŝi pruntepreni  
Okdekjariĝfestlegajon !<sup>1</sup>



---

<sup>1</sup> Antaŭ la ĉefa pordo de la Urba biblioteko kie CDELI troviĝas, videblas du bronzaĵaj statuoj pri nuda paro de junuloj. La bronza virino legas, dum la bronza viro rigardas ŝin. Sur la muroj de la CDELI-salono troviĝas galerio de portretoj. Inter tiuj videblas la portretoj de Komenio, Lejbnico kaj Kartezio.

# Michel Duc Goninaz

## Gratulon, Claude Gacond !

La homon, kies okdekjariĝon ni festas hodiaŭ, mi ekkonis antaŭ pluraj jardekoj per la ekde 1963 ĉiusemajne ripetiganta formulo « ... parolas Claude kaj Andrée Gacond », en tiu forpasinta epoko, kiam la radio-elsendoj ludis gravan rolon en la uzado de nia lingvo. Svisa Radio Internacia tiam kontribuis (eĉ se pli modeste ol Varsovio kaj Pekino) al tiu grava tasko dissendi nialingvajn informojn per tio, kion oni tiam nomis la « kurtaj ondoj ». Ĉiu el la du ĉiusemajnaj elsendoj havis sian karakteron : tiu de Arthur Baur pli svisa, tiu de la paro Gacond pli esperantista. El ili mi, kiel multaj aŭskultantoj, multon lernis pri la traktitaj temoj kaj pri la lingvouzado de la parolantoj.

Mi renkontis lin en Ĉaŭdefono, kiam mi vizitis unuafoje la bibliotekon interlingvistikan, kiun li tie kreis. Mi estis mirigita pro la amplekso de tiu laboro. Mi renkontis lin defore sur la paĝoj de la tre modest-aspekta *Monata Cirkulero* de la Kultura Centro Esperantista, kies fondinto kaj sekretario li estis. La agadtereno de tiu kultura centro, kies naskiĝoloko estis Romandio, ampleksis tutan Svislandon kaj baldaŭ ekhavis internacian dimension. En la *Monata Cirkulero* oni eksciis jam en 1967 pri la fondo de *Centre de Documentation et d'Étude sur la Langue Internationale*, dek jarojn poste pri la fondo de la *Gastejo*

*Edmond Privat* kaj la *Internacia Feria Altlernejo*, intertempe pri la kampanjo *Esperanto en la lernejojn*, la organizado de kulturaj semajnofinoj, la skiferioj en Adelboden, la eldonaĵoj de la kolekto *Studoj* pri lingvosciencaj kaj beletraj temoj. Ĉu Gacond ĉion ĉi faris mem ? Certe ne : la monataj cirkuleroj estas granda katalogo de respondeculoj, zorgantoj kaj helpantoj de tiuj organizaĵoj. Sed en ĉiuj entreprenoj ĉeestis, oficis, laboregis kaj probable ofte iniciatis Gacond.

Unu el la meritoj de la *Monata Cirkulero* estas la publikigo de valoraj artikoloj, verkitaj de homoj, kies nomojn certe rekonos kleraj esperantistoj : T. Carlevaro, P. Janton, C. Piron, I. Szerdahelyi, A. Bausani, H. Mayer, R. Hauptenthal, B. Golden, P. Lévy. Mi menciis senorde kaj probable forgesis kelkajn. Claude Gacond mem publikigis tre longan artikol-serion (fakte tekstojn de radio-elsendoj), kiu etendiĝis de aŭgusto 1977 ĝis marto 1978, pri « La instruado de Esperanto en la servo de la instruado de la franca lingvo al franclingvaj gelernantoj ».

Ĉar jen la ŝlosilo de lia tuta agado : Gacond estas unuavice instruisto – ne nur instruisto, sed pedagogo. Tion montras lia zorgo por gvidado de kursoj ne nur en lernejoj, sed ankaŭ en instruaj organizaĵoj, lia instigo al okazigo de pedagogiaj seminarioj por trejni novajn instruistojn. Tion mi povis konstati, kiam mi ĉeestis staĝon, kiun li gvidis en la


Buresa *Kvinpetalo*, kie li instruis plurajn fojojn en la jaroj 90. Mi ĝojas, ke mi estis lia lernanto dum unu semajno. Prave, ĉu ne? Mi ja estas pli juna, ol li... Kaj min eĉ ne iritis aŭ incitis la laŭtaj laŭdoj de mia edzino, ŝiaj entuziasmaj komentoj: « Gacond estas mirinde bona pedagogo... » kc., ktp. ! Ŝi ja pravis. Kompreneble, mi certe alportus kritikon al lia bildeca prezeno de la fraza sintakso, ĉar oni ne povas trakti sammaniere ĉiujn prepoziciajn komplementojn. Sed tiajn detalojn ni rezervu por lingvistaj diskutoj.

Tiu laborado ekster la kadroj de la tradicia Esperanto-movado montriĝis

fruktodona. En la diversaj aktivadoj, kiujn li iniciatis, li estis animo, motoro – aŭ elektu alian metaforon laŭplaĉe –, sed nek ĉefo, nek guroo, nek memnomita eminentulo. Li estas homo sen pretendemo, bombasto aŭ vana kverelemo. Li rilatas humure al tiaj fenomenoj en la esperantistaro: tion mi povis konstati dum nia plej lastadata renkonto margene de la Ĉaudefona SAT-kongreso en 2003.

Ni scias, ke nia nuna omaĝo ne estas bilanca, ĉar lia aktivado certe ne finiĝis. Sed jam nun ni povas diri, kiom gravis lia ĝisnuna laborado por doni novan vizaĝon al faltoza Esperantujo.

## Andres Bickel



### De mi pri li tra ci :

#### De mi, do

Nu, kiu do estas mi? Resume, ciferume: esperantisto de 41 jaroj, movada aktivulo dum sume 23 jaroj, verkinto de 22 artikoloj aŭ artikol-serioj, esperanto-instruisto en 19 kursoj, aktoro dum 15 teatraj prezentoj, iama aŭ nuna membro en ok societoj, redaktisto de kvar gazetoj (inter kiuj *Svisa Esperanto-Revuo* dum du jaroj!), prezidinto de du societoj, aktoro en unu filmo. Nomo: Andres Bickel.

#### Pri li, nun

Se, post tiom da jaroj, mi preskaŭ ĉion forgesus pri li, kio restus



neforviŝebla en mia memoro ? Restus la vortoj. Ĉar en la komenco estis Vorto. Kaj ĉar mia unua kontakto kun esperanto estis tra **li**. Dum tiu decidiga unua kontakto, **li** rakontis anekdoton pri Edmond Privat kaj Hector Hodler kiam, eklernintaj esperanton, ili sekretlingve klaĉis en tramo pri iu pasaĝero kun longa nazo. Jen do la unuaj esperanto-vortoj, kiujn mi tuj komprenis : « longa nazo ».

Post unujara lernado, mi ne volis plu nur lerni esperanton, mi deziris alproprigi la lingvon al mi. Tial mi veturis al la skisemajno, kiun **li** tiam organizis en Adelboden. En vortan lavangon mergiĝis mi tie ! Kaj en tiu lavango pintis la vorto « ĝi ». Kio do estis ĝi ? Estis iu partoprenantino, do virino, kiu restis tiom fremda al la ĝenerala etoso, ke plej konvenis nomi ŝin « ĝi ».

Loĝante en Ĝenevo, mi frekventis la ĝenevan movadon. Okazis dum kunveno, ke mi devis prononci kelkajn banalajn vortojn kiel enkondukon al prelego **lia** : tondra aplaŭdo sekvis miajn vortojn kaj fremdigis min ! Iam poste, dum **li** instruis min pri historio de la ĝeneva movado, **li** rakontis pri Hans Jakob, kiu kutimis enveni la kunvenejon « kiel ŝipo en havenon », kompreneble vekante tondran aplaŭdon !

Ofte mi suprenveturis al la neŭŝatela montaro por renkonti **lin**, lerni de **li** kaj eĉ helpi **lin**. Kiam ekkonstruiĝis Gastejo Edmond Privat, **li** fiere elmontris la panoramon super la urbo, kun meze de la vidaĵo impona uzina kamentubo : laŭ kunlaboranto **lia**, jen « simbolo de seksa ekscitiĝo ». Tiu imago ne nur fontas

el petolemo ; laŭ mi, ĝi plene kongruas kun la fekunda vivo de KCE. Ja sufiĉas, ke mi rememoru **lin** emociplene konstati ke KCE iel estas **lia** « infano ».

Alia fieriĝo **lia**, tiam senvorta : igi ke Ivo Lapenna – frakase forlasinta UEA-n – kaj Grégoire Maertens – nova UEA-prezidanto – kune tenu la ŝildon de inaŭgurata KCE-domo. Jen potenca simbolo de **lia** kerna strebado : homojn kunigi anstataŭ disigi.

Dum oni debatadis pri la esperantigo de propraj nomoj (ĉu skribi nacilingve, ĉu skribi fonetike, ĉu esperantigi kun finaĵo), **li** eldiris sian simplan kaj pragmatan solvon : « Skribu nacilingve, prononcu esperante ; ekzemple, vian nomon oni ne prononcu [bikel], sed kiel skribite [bitskel] ! »

Ĉiu ajn havas siajn vortajn kutimojn. Ofta **lia** vortumo estas « tio korespondas al » kun la senco de « tio respondas al, tio rilatas al ». Ĉu francismo – ĉu eraro – ĉu mallertaĵo ? Mi neniam rimarkigis tion al **li**; mi preferis konsideri tiun vortumon **lia** propraĵo. Propraĵo pri kiu tiom korespondema homo rajtas fieri !

Jes ja, pri vortoj **li** havas emon uzi la plej taŭgan. Tion atestas travivaĵo **lia** dum la armea rekrut-servo : **li** konsekvence rifuzis alparoli la oficiojn per titolo alia ol la nura « sinjoro » ; **li** rifuzis abdiki sian civilecon. Tia **li** estas, mia Claude Gacond.

### Tra ci, tamen

Vi ambaŭ petis min verki tiun ĉi salton en pasintecon 41 jarojn foran. Nu, alveturinte la skisemajnon en



Adelboden, mi pretigis min unuafoje alparoli iun en esperanto. Mi diris « bona tago ! » al la unua persono bonveniganta min : tiu estis ci. Vi ja estas la solaj de mi konataj, kiuj ci-umas inter vi. Diru « vi » al ambaŭ, diru « ci » al unu el vi : praktike, ĉu

ne ? Ja mia unua demando de esperanto-lernanto al Claude Gacond estis : kiel distingi inter vi unu-persona kaj vi plurpersona ? Nu, li ne proponis al mi diri « ci » kaj « vi » kiel Richard kaj Martine Schneller !



*Adelboden : la ĉaledo Egghaus en kiu dum 22 vintroj disvolviĝis la Internacia Esperantista Skiferio. Entute en tiu ĉaledo ĉirkaŭ 250 skiemuloj ĝuis sian sporton en plene esperanta etoso. (Foto 1968-12-31)*



*Inter la skiantoj de 1971 rimarkiĝas la paroj Raoul kaj Cosette Cop, Claude kaj Andrée Gacond, John kaj Jeannette Thum, Richard kaj Martine Schneller kaj la juna Andres Bickel. (Foto 1971-01-01)*

# Arlette Di Vetta

## Memoro, memoro, kiam vi kaptas nin !

Mi ĉiam memorigos la unuajn kontaktojn, kiujn ni havis, Claude kaj mi. Estis dum skiferiado en Adelboden. Mi estis tre juna. Mi konis Esperanton, sed mi ankoraŭ ne regis la fluan paroladon. Mi memoras bonege, ke Claude admonis nin : la krokodilantoj ricevos punan ted-aĵon : lavi la teleraron ! Mi devis plurfoje plenumi tiun taskon ! Mi pensis, ke ankaŭ tiu laboro estas valora. Unu plian fojon, estis okazo babili kun la aliaj feriantoj. Ni devis esti tre singardaj, ĉar la oreloj de Claude enŝoviĝis ĉien !

Mi ĉiam admiris lian entuziasmon : Esperanto estis la motoro de lia vivo. Kiom da fortoj li elmontris en tiu direkto ! Mi konstante miregis ĉe lia bonega pedagogio. Claude engaĝis sin por Esperanto, li agis tiele kun konvinko. Li volis transdoni sian pasion al ĉiuj. Kiel aliuloj tra la esperanta mondo, li animis seminariojn, verkis artikolojn, instruadis, partoprenis kongresojn, ktp. Tio estas lia tuta vivo !

La pedagogio estis lia movnervaro, lia referenco, lia idealo. Li ŝatas la interŝanĝojn, la komunikadon, la transdonon de scioj. Kaj precipe li scias aŭskulti la aliajn. Ne plu juna laŭ la aĝo li estas, sed juna spirite,

ĉar li ĉiam aktivus. Lia sindonema edzino, en lia ombro, helpis lin konstante en liaj taskoj.

Farante serĉadon, tute hazarde mi retrovis dokumentojn, kiujn verkis Claude Gacond. Mi konservis ilin, ĉar la enhavojn mi taksis interesa ! Mi povas mencii ekzemple *Literatura Mondo*, kie li listigis la plej signifajn kaj altirajn tekstojn el tiu revuo, ankaŭ didaktikan dokumenton pri Leibniz *Pri la planlingvaj esploroj*, ankoraŭ alian (parte de la *Didaktika Antologio*), kiu pritraktas la homaranismon de Zamenhof, kaj korespondaĵojn datitajn... de antaŭ multe da jaroj. Mi relegas tiujn tekstojn kaj konstatas ankoraŭfoje, ke lia sindono por Esperanto estis konsanta batalo por respondi al kritikoj kaj al trompaj aŭ mensogaj asertoj de kelkaj homoj.

Aliaj famaj cerboj en Svislando helpis en la progreso de la lingvo Esperanto ; mi pensas ĉefe pri Claude Piron, kiu lasis al ni ankaŭ skribaĵojn en iniciatema klara stilo, stilo alirebla por ĉiuj, tiom en la vortoj kiom en la temoj.

Ni esperu, ke en la estonteco ĉe estos ankoraŭ tiaj homoj, kiuj laboras por la bono de la homaro. Mi esperas, ke estos multaj !

Dankon al ĉiuj tiuj esperantistoj : kiuj trapasis, kiuj vivas kaj kiuj reprenos la torĉon !

# Nicole Margot

## Duona generacio post Claude Gacond

Kiam, en la lasta numero de SES 2010, mi esprimis mian malbon-humoron kontraŭ krokodilado mi forviŝis iujn laŭdajn frazojn al Claude Gacond, opiniante ke ne taŭgas tro laŭdi. Sed en omaĝa artikolaro, kial ne ?

Kiam mi ekmiris pri krokodil-emo, por mi nova en Svislando, mi memoris, ke dum miaj unuaj paŝoj en la svisa Esperantujo ne venus al mi la ideo krokodili. Povas esti, ke mi iom beligas memoraĵojn, sed konfuze mi revidis bildojn de junulara aranĝo en « les hauts de Pully », proksime al Laŭzano, kie la rigardo de Claude, glacie kritika, igis ĉian krokodiladon hontinda. Nu, honto ne estas pozitiva sento por progresi, sed ŝajne estis io plia malantaŭ la kritika rigardo, iu forta sento, ke tutsimple Esperantujo ne povas esti franc-parolejo. Tion, mi kredas, Claude enkondukis en la svisan Esperantujojn, kiun mi tiam frekventis. Ĉu ne ? Aŭ ĉu mi vere tro idealigas la pasintecon ?

Mi apartenas al tiuj multaj svisaj esperantistoj, kiuj ĉiam vidis Claude Gacond kiel gvidanto en la svisa movado. Al tiuj kiuj estis instruitaj pri la uzo de *-ig* kaj *-iĝ* sur la flaneltabulo, kiel du brakoj de la baza verba elemento. Al tiuj, kiuj vizitis la kulturajn semajnfinojn, unue en Renens kaj poste en La Chaux-de-Fonds. Al tiuj kiuj mi-

gradis en la neŭŝatela Ĵuraso, skie dum la vintro kaj piede dum la somero.

De duona generacio post Andrée kaj Claude, mi apartenis al tiu 68-ula generacio, kiu verŝajne ŝajnis iom naiva kaj malserioza al ili. Ja ni kundividis la saman emon al pacifismo, al iu socia progresemo, al iu aktiviga instruadmetodo, sed ĝi esprimiĝis alimaniere, kaj, kiam Marie-Louise Münger kaj mi proponis por la SES-bulteno, kiun Claude jam redaktis en tiu epoko, artikolon titolitan *Revolucio en la lernejo* li skeptike ricevis ĝin, sed pedagogie kaj demokratece ĝin akceptis malgraŭ la atendita skandaligo de la tiamaj esperantistoj.

Mi do apartenas al tiu generacio, kiu vidis la naskon de KCE, kiu helpis al modernigo de la domoj, detruante ŝenutilajn murojn kaj malnovajn kaŝelajn hejtilojn.

### Al kio povas konduki staĝo pri tradukarto en KCE ?

Sed mia plej grava memoraĵo de tiu belega kvindoma Kultura Centro, kie mi renkontis altnivelajn prelegantojn kaj amikiĝis kun polaj kaj aliaj orienteŭropaj studentoj riĉaj de interesaj ideoj pri Esperanto, datumas de la somero 1988.

Mi aliĝis al tutsemajna tradukkurso kaj tiucele rapide kolektis diversajn tekstojn, ĉiuj pri romandaj aŭtoroj.

Unu teksto aparte interesis min, kaj, kvankam temis nur pri literatura



recenzo verkita de Jean-Louis Kuffer, romanda verkisto, do eĉ ne duona paĝo de la gazeto *Le Matin*, mi ŝvitis dum unu semajno pri ties traduko. Tiu recenzo traktis libron de Adrien Pasquali, *L'Histoire dérobée*, (*La rabita Rakonto*), eldonita de « L'Aire », kiun mi poste legis kun vera enamigo. En tiu libro la aŭtoro priskribis sin kiel teksbirdo (tiel mi tradukis la francan vorton *tisserin*), kiu teksas al si nestojn botelformajn, sed « la bildon de teksbirdo anstataŭas tiu de kukolo, ĉar veras, ke en ses nestojn – plus unu – la verkisto demetis ovon », skribis J.-L. Kuffer, kaj li daŭrigis : « Fakte ses el la ĉapitroj de *La rabita Rakonto* parodias la stilon de la plej bonaj roman-daj aŭtoroj : de Ramuz al Mercanton, sen forgesi Catherine Colomb, Georges Haldas, Georges Borgeaud kaj Charles-Albert Cingria. »

Do tiu traduksemajno ne nur enamigis min al la verkoj de Adrien Pasquali, sed malfermis miajn okulojn al ankoraŭ nekonataj romandaj aŭtoroj. Tiu traduko poste aperis en la SES-bulteno kaj Claude konsilis al mi sendi ĝin al la recenzisto Jean-Louis Kuffer. Ŝajnas tamen, laŭ miaj arkivoj, ke mi unue leterintervjuis Jean-Louis Kuffer, kiu respondis, inter alie, ke « li brulurĝe deziras vidi tekston lian reaperi en Esperanto ! ».

Fakte tiuj preskaŭ unuaj paŝoj de Adrien Pasquali (li unue verkis *Eloge du Migrant* (*Laŭdo de la Migranto*) estis sekvataj de dua volumo ankaŭ apartenanta al *La portreto de la artisto en « Juna teksbirdo »*, sed ĉifoje ĝi titoliĝis *Ek al la laboro* (*Passons à l'ouvrage*).

La aŭtoro ne plu pastiĉis sed verkis laŭ propra stilo, rakontante kiel profesoro de lingvo kaj kulturo itala al junaj enmigrintoj iĝis verkisto.

Adrien Pasquali naskiĝis en 1958 en la valeza vilaĝo Bagnes, de gepatroj venintaj el Italio por trovi laboron. Eklogis min la fakto, ke li tre konscie vivis sian duecan kulturon, kaj tiu valorigo de plurkulturismo ankoraŭ ne modis kiel nun. Lia franca lingvo flirtis kun la itala, donante al ĝi apartan kreivon, li mem foje diris, ke « li sentas sin en daŭra traduko ».

Tiun romanon *Ek al laboro* mi aĉetis en 1989 en la ĝeneva Libra Foiro, kaj tie havis la ŝancon interŝanĝi kelkajn vortojn kun la aŭtoro kaj foriri kun iu dediĉa subskribo lia.

Dek jarojn pli poste Adrien Pasquali memmortiĝis en Parizo kaj J.-L. Kuffer tiam verkis recenzon pri la lasta libro de Pasquali : *Le Pain de silence* (*Pano el silento*). Tiu eta libro dense priskribis la pezan komunikmankon regantan en lia familio. Li estis sola infano inter patro, laboristo en baraĝkonstruejo, kaj « patrino malsanema, ŝrumpita en sia hejmo, kie ŝi senpolvigadis en negliĝo antaŭ ol reiri litten, sen forgesi furioze postĉasi la cigaredŝtumpojn de sia edza kunulo ». Preskaŭ ne eltenebla esprimo de sufero.

Tiun jaron en la ĝeneva Libra Foiro, mi vidis, ke la verkoj de Pasquali plu vendiĝas. Li ne nur postlasis suferesprimajn verkojn, kiel lian lastan libron. Aŭtoro de ok romanoj kaj rakontoj, sed ankaŭ de eseoj pri Ramuz, Roud, Bouvier kaj la vojaĝrakontoj, li ankaŭ tradukis plurajn tekstojn el la itala kaj estas




plu konsiderata kiel brila romanda intelektulo. Ankoraŭ tiun ĉi jaron la valeza verkisto Jérôme Meizoz publikigis postmortan leteraron al Adrien Pasquali : *Lettres au perdu. Et autres écrits de la boîte noire (Leteroj al pendumito. Kaj aliaj rakontoj el la nigra skatolo)*. En ĝi Jérôme Meizoz dialogas kun sia forpasinta kolego pri nuntempa lite-

raturu, pri sia serĉado de propra verkstilo kompare kun la serĉadoj de Pasquali kaj pri politiko, informante la forpasinton pri la UDC\*-povkapto en la valeza kantonu.

Jen al kiu malkovro kondukis tradukstaĝo en KCE kun Claude Gacond !

\* UDC/SVP : svisa dekstra politika partio.

## Ed Borsboom



(Fotis Claude Gacond)

*Naskita en 1936, Ed Borsboom lernis esperanton en 1951 kaj senĉese aktivis sur tiu kampo (TEJO, Internacia Esperanto-Instituto, Altlernejo de La Chaux-de-Fonds, Kvinpetalo ktp). Li prezidas la estraron de IEI (Internacia Esperanto-Instituto) de 1995.*

*De jardekoj intima amiko de Claude kaj Andrée Gacond, li klopodas renkontiĝi kun ili minimume unu fojon ĉiujare.*

### **Kun Claude Gacond en la Altlernejo de La Chaux-de-Fonds**

Kvankam Claude Gacond kaj mi partoprenis en la TEJO-kongreso de 1954 en Hilversum, Nederlando, ni tamen vere konatiĝis unu kun la alia dum la skisemajno en Adelboden en 1968/1969. Claude en tiu periodo organizis por junuloj kunestadon, dum kiu oni povis kombini sporton kun konversacio en la Internacia Lingvo. Sed li ne forgesis enmeti en

la programon unu vesperon kun peco da specife esperanta kulturo. Claude Nourmont, iu parizano kaj mi ricevis la taskon, prizorgi tion. La triopo decidis komune enkonduki la faman erotan verkon de Peter Peneter *Libro de Amo*. Mi per anekdotoj skizis la historion de la libro kaj alterne ambaŭ aliaj lardis tion per laŭtlegado de ne-ĉastaj sonetoj. Ĝi estis sukceso. Claude Gacond petis min instrui en sia kreota altlernejo. Tiu lia projekto efektiviĝis en La Chaux-de-Fonds en 1980.

Mi instruis tie en 8 jaroj :

1981	12-17/ 7	5+5	B,CH,E,F,NL	3	la 20 plej bonaj verkistoj
1982	18-23/ 7	2+9	CH,F,GB,NL	4	la 20 plej bonaj verkistoj
1983	17-22/ 7	4+6	CH,D,F,NL	3	la plej bonaj verkistoj
1984	---				
1985	---				
1986	11-16/ 8	4+6	B,CH,F,JP, NL	4	E-o-literaturo post 1952
1987	10-15/ 8	8+8	A,B,CH,D,E,F,JP, NL	6	apudbeletro
1988	17-22/ 7	2+8	ALĜ,CH,F,GB,NL	3	E-aj libroj inter 1918-1940
1989	24-29/ 7	8+8	B,CH,D,E,F,JP,NL,S	5	Zamenhof kaj Privat
1990	23-28/ 7	9+5	A,B,CH,DK,F,GB,NL	5	recenzo-arto

En la 3-a kolono : « 5 + 5 » estas la unua cifero *viroj*, la dua *virinoj*

En la 4-a kolono : « B,CH,E,F,NL » estas *landoj*

En la 5-a kolono : « 3 » estas *lingvoj*

En la 6-a kolono : estas *temo*

En 1986 ni al kroĉis tuj post mia kurso Piĉ-semajnfino, kiu allogis dek ekstrajn esperantistojn.

La kunlaboro inter Claude kaj mi ĉiam estis tre bona, kvazaŭ la du botoj, kiuj faras paron. Ni egale opiniis pri instruado de Esperanto, ja ambaŭ apartenis al la skolo de Cseh, kiu preskribis gajan etoson kaj praktikan aplikon de la lingvo. Mi mem metis la kondiĉon, ke minimume dek personoj aliĝu. Krome ni strebis al vere internacia kunveno. Ambaŭ postuloj estis realigitaj. Ni planis kursdaŭron de ses tagoj, el kiu unu tago en la mezo estis dediĉita al ekskurso tra parto de Ĵuraso sub gvido de Claude. Tiel oni kaptis ankaŭ la ferian aspekton en tiu sesio. Claude ĉiujare elektis alian lokon, por ke aliĝantoj, denove partoprenantoj, ne revidu la samon. Li konsilis al enskribintoj almenaŭ unu tagon pli frue alvojaĝi, ĉar ĉiu devis adapti

sian korpon al la alteco de la centro, kiu kuŝis je 1100 metroj.

Kurstago enhavis du lecionojn : je la 9.00-10.30 horo kaj post paŭzo de 30 minutoj je la 11.00-12.30 horo. Post tio ni komune lunĉis. La posttagmezo estis libera, kelkaj vizitis la centron de La Chaux-de-Fonds aŭ migretis en la ĉirkaŭaĵo. De tempo al tempo vespere okazis programero de iu el la kursanoj.

Dum la jardeko okazis ofte ne atenditaj scenoj. Jen tri floroj el tiu bukedo. Por la unua fojo en 1987 aperis kun grupo da japanaj komencantoj la geedzoj Tacuo kaj Masumi Huĝimoto, kiujn mi hazarde persone konis, sed Claude ne. Ĉiu ricevis de Claude en la oficejo de la centro sian ĉambromeriton. La Huĝimotoj, kiel kondukantoj, modeste staris tute malantaŭe. Troviĝante mem ĉe la flanko, mi rimarkis, ke Claude eldonis la ĉambrojn laŭ rangordo de komforteco, tiel ke la lastaj, Tacuo

kaj Masumi estis ricevontaj la malplej belan. Tion mi volis bloki, sed mi ne povis iom laŭte super la kapoj de la gastoj averti tion al Claude en Esperanto. Pri alia komuna lingvo ni ne disponis kaj li ne komprenis mian francan balbuton.

Tiel la geedzoj enejiĝis en veran kamereton. Kiam ĉiu estis for, mi eksplikis al Claude la situacion. Li komentis : « Aĥ, mi donis al la plej grava la malplej gravan ĉambron. Malbonŝance ! »

Iu leciono komenciĝis kaj surprize iom poste eniris Claude, akompanata de mezaĝulo kun ne afabla vizaĝo. Claude klarigis, ke la sinjoro ne parolas Esperanton, sed tamen interesiĝas en mia lekcio. La misterulo eksidis tute aparte malantaŭe, observis min kaj la kursanojn kaj aŭskultis la diskutetojn. Kion pensi ? Ĉu ĵurnalista, ĉu inspektoro de la svisa instruado, ĉu komunuma oficisto ? Ĉe la fino li senvorte foriris kaj nia nekonfuzebla Claude reaperis kaj malvualis la enigmon. Temis pri komisaro de la sekreta polico, supozanta ke nia grupo estas komunista ĉelo sub mantelo de sendanĝera literaturkurso. Feliĉe mi ne estis pritraktinta la rusojn Hohlov, Miĥalski, Nekrasov sed la okcidentanojn Auld, Boulton, Waringhien, Schwartz. La konspirantoj ne estis arestitaj.

Claude estis bonega gvidanto, li ĉiam dum ĉiuj problemetoj kaj disputoj restis trankvila, libera de ĉia ekscitiĝo kaj kolero. Nur unu fojon mi vidis lin en embaraso. Okazis du kursoj samtempe dum iu semajno. Ĉirkaŭ 30 personoj kolektiĝis por la malfermo en la klasĉambro. Claude

kaj mi sidis antaŭe kaj Claude diris kelkajn edifajn frazojn. Sed ekstaris 40-jara viro, filo de la prezidanto de la ĉeftribunalo en Svisio, kion mi poste aŭdis. Li interrompis per la rimarko, ke dum tia solenaĵo decus, komenci per preĝo. Claude mutiĝis, rigardante al mi. Kiel reagi ? En la okuloj de la viro mi supozis vidi ian mokon aŭ ironion. Li certe ne volis preĝi. Sekve mi samstile respondis, ke mi plenplene konsentas kun lia trafa ideo, ni bezonas nur surpaperigi protokolon por ĝi kaj tio kostas tempon. Do farenado por la sekvonta jaro. Li eksidis. La paralizo estis rompita kaj Claude daŭrigis.



*Ripozas sur benko : Ed Borsboom, André kaj Claude Gacond en Treviro/Trier.*

*(Fotis Els van Dijk)*



## Andrée Gacond



(Fotis Stefano Keller)

### Vivi kun Claude Gacond

Se mi rigardas la paperojn, la ĵurnalojn kaj la revuojn kiuj kuŝas sur la salona tablo, mi jam havas partan bildon de mia edzo: jen la loka tagĵurnalo, la tutromanda tagĵurnalo kaj la revuo de la romandaj konsumantoj; al tio indas aldoni kunvokilojn al kunsidoj de la Socialista Partio. Tio pruvas intereson por la publikaj aferoj. Aliaj legaĵoj estas kelkaj revuoj esperantistaj: *Monato*, *Femina* (tio estas por mi, sed ne nur!), *La Gazeto*, *Sennaciulo*, *La Ondo de Esperanto* kaj kvarfoje jare *SES informas* kiun Claude redaktas (feliĉe ne tute sola!). Ankaŭ troviĝas sur la salona tablo pluraj broŝuroj priskribantaj ekskursojn ĉu piede, ĉu trajne. Sed tio ne malebligas al li imagi originalajn vojaĝojn aŭtomo-

bile. Tio pensigas min pri grava parto de nia vivo: nome niaj tre belaj vojaĝoj diversaj per nia kampad-buseto.

Por reveni al la salona tablo, troviĝas tie relative ofte invitoj al prelegoj, ĉu en La Chaux-de-Fonds, ĉu en Neuchâtel: Club 44, societoj de geografio, de historio, de arkeologio, de etnografio, de natursciencoj (kiuj estas la unua intereso, kronologie antaŭ Esperanto). Ni havas neforgeseblajn memorojn de revenoj el Neuchâtel tra la pasejo de La Vuedes-Alpes meze de la nokto post unu el tiuj prelegoj, kiam nia aŭto « Kokcinelo » estis kaptita inter du kunverĝantaj amasoj lasitaj de la senneĝigilo...

Sed Esperanto estas tio kio superplenigis nian vivon: dum nia juneco,



la gajegaj kaj labordonigaj skiferioj okazintaj dum pli ol dudek jaroj en Adelboden. Tio postulis rezignon de privataj skiferioj, animadon de grupo per ridigaj lingvostudoj post longaj tagoj sur la skioj, glacia akvo por sinlavado, zorgoj por manĝado (kun pluraj kunlaborantoj), sed ankaŭ tre amuzaj novjaraj kaj epifaniaj festoj. Unuvorte : multe da zorgoj kaj pli multe da ridoj.

Post Adelboden komenciĝis la granda aventuro de KCE (Kultura Centro Esperantista) en La Chaux-de-Fonds. La unua problemoj estis financa : kiel aĉeti sep domojn samtempe ? Sed Claude, filo de komercisto kaj kiu ĉiam estis bona matematikisto, riskis la tuton kaj sukcese ekvilibrigis ĝin ! Denove la someraj ferioj estis dum jaroj oferitaj al la centro. Eĉ pli : ofte la labortagoj por Claude komenciĝis je la kvara aŭ kvina matene por pretigi matenmanĝojn, daŭris per publika instruado plentempa kaj vesperoj kiel

grupgvidanto. Ili finiĝis preskaŭ ĉiam post meznokto por certigi ke ĉiuj lampoj estu elŝaltitaj kaj la poroj ŝlositaj.

Samtempe Claude povis obteni de la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds malfermon de la Fondaĵo Edmond Privat, kun la helpo de Yvonne Privat kaj Pierre Hirsch, kaj la fondaĵo de CDELI (Centro de dokumentado kaj studado de la lingvo internacia). Per tiuj fondaĵoj la biblioteko riĉiĝis de kelkaj trezoroj. CDELI ĝis nun okupadas Claude. Li kapablis akompanigi sin de pluraj atentemaj kaj ŝatindaj kunlaborantoj.

Ĉar mia tasko en CDELI estas ordigi arkivojn pri kongresoj kaj esperantistaj renkontiĝoj, mi miras ofte kiom da ili ŝuldiĝas al la ideoj kaj agemo de mia edzo.

Jen senorde kaj sen pretendi al kompleteco aŭ al literatura valoro, kelkaj memoroj pri vivo tiom plena kaj interesa kiun ni kune vivis. – Dankon Claude !




*Se ili multe vojaĝis per sia kampadbuseto (fidela amiko dum kvardek jaroj kiu nun deĵoras en la esperantista familio Béatrix-Koleva), Claude kaj Andrée Gacond ankaŭ tre ŝatas sian neŭŝatelan Ĵurason.*

*(Fotis Andrée Gacond 1998)*



Ĉi tie en Creux-du-Van kun (de maldekstre) Madeleine kaj Henri Vatré (Henri Baupierre), la eldonisto Régulo Pérez kaj ges-roj Irm kaj Reinhard Haupenthal. (Foto 1973)



En La Sagne (kie ili vivis de 1954 al 1981) la aktiveco de Kultura Centro Esperantista disvolviĝis dum la unua deko da jaroj en ilia domo (Miéville 133). (Foto 1970)



# André Cherpillod

## Sur insulo malproksima...

Oni nelge petis de mi, ke mi verku artikolon honore al Claude Gacond, ĉu pri li mem, ĉu pri lia lando. Evidente, mi akceptis kun entuziasmo.

Sed vespere, en mia lito, mi cerbumis kaj konstatis, ke tiu akcepto metis min antaŭ abismon da malfacilaĵoj. Kion diri pri Claude, krom tio, ke li estas tre estiminda homo, kiu multe laboris kaj plu laboras, tre efike, por Esperanto? Kion diri pri lia lando, krom tio, ke Edmond Privat estis sviso, ke Svisio produktas bonegan ĉokoladon, kaj ke ĝi ofte donas lecionojn de demokrateco al la Francia reĝlando, ekzemple kiam la svisoj voĉdonis inteligente kontraŭ la kopolado kaj multiĝo de la islamaj falusoj (t.e. la minaretoj)?

Antaŭ ol endormiĝi, mi pensis pri Edmond Privat, kiu akiris de la Universala Poŝta Unio, en 1925, ke Esperanto estu rekonata kiel « klara lingvo » en telegramoj. Evidente, la uzado de nia lingvo en telegramoj implicis la anstataŭigon de la ĉapelitaj literoj per la posta litero H, kiel cetere estas oficialigita en la Fundamento. Nun, telegramoj estas ne plu uzataj, sed la ĉapela problemo restas aktuala en la Interretaj mesaĝoj.

Mi endormiĝis kun tiuj problemoj en la kapo. Kaj mi faris strangan sonĝon. Eble kulpas pri tio Edmond Privat, kaj lia nereakta rilato kun la surliteraj ĉapeloj.

En mia sonĝo, mi troviĝis en tribunalo kiel akuzito. En la vico de la juĝistoj, mi rekonis plurajn eminentulojn de la du francaj esperantistaj asocioj, kaj ankaŭ plurajn akademianojn. Ili ĉiuj montris min per akuza fingro, kaj blekis: « *tiu homo estas monstro: li ne volas akcepti la reformitan ortografion, kun la litero ikso* ». Mi provis rebati, ke la X ne apartenas al la Esperanta alfabeto, kaj ke la Fundamento mem preskribas la uzadon de la H kiel surogato de la cirkumfleko, en kazo de bezono.

Vane! La prezidanto de la tribunalo respondis al mi severtone, ke la Fundamento estas tri centimetrojn dika, kaj ke ĝia utilo estas nur sidi sur ĝi, kiam oni havas seĝon ne sufiĉe altan. Sed la Fundamento, li diris, ne povas utili por alia celo. Tiam falis la verdikto: mi estis kondamnita al 1887 jaroj da restado sur senhoma insulo, kun la rajto kunporti tien unu solan libron.

Mi vekigis ridante: kia freneza sonĝo! La senhoma insulo memorigis al mi iun pian kaj piigan libron, kiun iu pastro pruntis al mi, kiam mi estis infano. Temis pri la vivo de kelkaj sanktuloj. Interalie, sankta Francisko Ksavero: lia parolo, evidente sub la inspiro de la Sankta Spirito, estis tiel arda, tiel flama, ke albordiĝante al senhoma insulo, en unu tago li konvertis dek mil indiĝenojn al la « vera kredo »!

Poste, mi pripensis pli serioze la aferon: se mi devus vere trapasi jarojn sur senhoma insulo kaj rajtus

kunporti unu solan libron, kiun libron mi elektus ?

La unua respondo, kiu ŝprucis el mia cerbo, estis : « *iun libron plej interesan, do unu el miaj propraj verkoj* ». Sed mi alvenis al la konkludo, ke la entenaĵon de miaj verkoj mi jam pli-malpli konas. Do mi elkovrus malmulton da novo.

Tiam aperis dua respondo : « *la Bibliion* ». Sed la Bibliion... pfu ! ĝi entenas tro da neeblaĵoj, da malmoralajoj, da militoj, masakroj, genocidoj. Ĉu anstataŭigi ĝin per la Korano ? Tio estus trafi el sub pluvo en riveron, kiel diris Zamenhof.

Feliĉe, iom post iom, tria respondo, kredeble definitiva, ekĝermis en mia menso. Mi opinias nun, ke mia elekto irus al la *Plena Analiza Gramatiko*, familiare la *PAG*. Eble, tiu elekto mirigos kelkajn... Efektive, mi rimarkis, ke multaj homoj ne ŝatas gramatikon, mi ne scias kial. Ili malpravas, ili ne konscias pri la valoro, kiun ili perdas.

Dank' al la *PAG*, miaj horoj estos vere paradizaj. Imagu la intensan ĝuon de la akuzativo, la dian feliĉon de la refleksivo, la superan beatecon de la predikativo, la senfinan paradizon de la participoj, la Elizeon de la vortordo, la Edenon de la kompletivaj subpropozicioj, la plenan orgasmon de la vortfarado... ĉio tio estos mia, kiam mi estos sur mia insulo...

Tie, mi povos legi, ke ĝuste iu fama sviso, Edmond Privat, kiu havis delikatan senton, emfazis, ke estas diferenco inter *la maro bluas* kaj *la maro estas blua*, *la kampoj verdas* kaj *la kampoj estas verdaj*. Cetere, ankaŭ Zamenhof deklaris, ke

la finaĵo *-i* ne signifas *esti*. Bedaŭrinde, tiun delikatan literaturan nuancon verŝajne ne ĉiu esperantisto havas la kapablon senti.

Mi povos ankaŭ legi re kaj re la ĉapitron pri la artikolo, en kiu aperas tre klare, ke la rolo de la *difina* artikolo... estas *difini* substantivon, kio neprigas, ke la manko de difina artikolo... *maldifinas* substantivon. Mi trovas pri tio multajn Zamenhofajn ekzemplojn, kiel : *la monto Karmel*, *la pastro Ezra*, *la princo Ramzes*, ktp. Tiam mi miros, memorante, ke mi legis (en *La Sago*) : « *palaco Chaillot, asocio Espéranto-44* »... Mi havos plenan tempon por cerbumi, kiel oni povas menci *iun palacon aŭ asocion nedifinitajn* (ĉar senartikolajn), kaj tuj difini ilin per ilia nomo. Tia groteska kaj kontraŭ-Zamenhofa absurdaĵo, tamen konstante trovebla, ekzemple, en *Monato*, eksplodigos min per ridego...

Mi memoros ankaŭ, ke en la novtradukitaj libroj de la lasta eldono de la Biblio, oni trovas similajn absurdaĵojn, kiel « *reĝo Antioĥo, reĝo Demetrio, reĝo Ptolemeo* », kastritajn de sia artikolo, kvankam en la Zamenhofaj partoj de la Biblio oni vidas la konstantan uzadon de : *la reĝo David, la reĝo Salomono, la reĝino Ester*, ktp.

Kaj imagu mian feliĉon, kiam mi relegos en la *PAG*, ke unu verbo **ne** povas esti samtempe transitiva kaj netransitiva, krom **unu** sola escepto : la verbo *fumi*. Mi des pli ĝuos tiun aserton, ke da tiaj verboj mi nombris en la *PIV sepdek naŭ*.

Vere, verege, mi ne enuos sur mia insulo... Ĉar mi travivis en la 60-aj jaroj la faman kverelon ata-ita, mi



relegados la ĉapitron pri la Fundamenta uzo de la participoj. Mi rememoros la faman svedan akademianon, kiu asertis, ke « *se la domo estis konstruata, tio signifas, ke ĝi fariĝis preta* ». Li simple forgesis la jenan evidentajon : se ago estas prezence, ĝi ne estas preterita, kaj reciproke. Do ĝi ne estas finita. Mi imagos tiun kompatindan homon, jam instaligintan en domo, kiu ankoraŭ ne havus tegmenton, eble eĉ ne plafonojn. Fronte al sia telero da supo, li tenus unumane sian kuleron kaj aliamane sian pluvombreton.

Dum pluraj jaroj, mia ĉefa hobbio estis la vortfarado. Tial, imagu kiom da fojoj mi povos plonĝi en la trian trionon de la *PAG*, ĝuste dediĉitan al tiu ĝua problemo. Mi relegos la luman demonstiron de K. Kalocsay, laŭ kiu la nudaj radikoj (*dom'*, *bel'*, *kur'*), sen ia finaĵo, estas per si mem,

jen substantivaj (*dom'*), jen adjektivaj (*bel'*), jen verbaj (*kur'*). Cetere, en du broŝuroj, mi proprigis tiun demonstiron, tiel nerefutebla ĝi estas. Eĉ substrekis tiun nerefuteblecon halanĝaj provoj de refutado, prezentitaj en prelego Akademia, dum Universala Kongreso en Berlino (sola argumento : tio estas akceptebla en naciaj lingvoj, sed ne en Esperanto). Ĉu eblas, mi certe pensos, ke oni elspezas tiom da cerba materio nur por pruvi nepruveblaĵon ?

Kaj sur mia senhoma (do senteda) insulo, ju pli mi profundigis en la Kaloĉajan demonstiron, des pli mi estos feliĉa, beata, des pli mi benos la sorton, kiu sendis min al tiu insulo libera je dupieduloj.


Urgas al mi la tempo, ĝis mi estos la sola vertikala paŝanto sur tiu benata insulo, tenanta inter la manoj la *Plenan Analizan Gramatikon*...



*Ekde la sesdekaj jaroj en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds, ĉiulunde laborgrupo helpis la bibliotekistinojn katalogi la rikoltitan dokumentaron. Jen la esperantistinoj H. Berger kaj A. Gacond kunlaborantaj kun la adepto de Occidental Alphonse Matejka kaj la bibliotekistino Suzanne Boichat. (Fotis C. Gacond, 1973-06-18)*

# CDELI en la komenco

(Periodo 1961-1967)



*Kun Alphonse Matejka*



*Kun Detlev Blanke*



*Kun Pierre Hirsch, la prizorganto de Fonds Edmond Privat.*



# Mireille Grosjean

## Subtila kaj efika varbstrategio

Post nia unua vojaĝo al Japanio en 1985, ni vidis ekspozicion pri Esperanto en la lernejo de Le Locle, kie ni instruis. Tiun ekspozicion konceptis kaj instalas Claude Gacond. Ne scipovante Esperanton, ni nur iometete povis komuniki kun japanoj, iom en la angla, sed japanoj tiam tre malmulte kapablis uzi ĝin, iom en la japana lingvo, kiun mia edzo studis. Do por ni en Japanio estis granda frustrado pro manko je bona komunikado. Tiu travivaĵo preparis nin al malkovro de la avantaĝoj de Esperanto.

Mia edzo revenis el la lernejo hejmen kun dokumentoj ligitaj al la ekspozicio, klarigis al ni ĉiuj pri Esperanto kaj konvinkis nin ; ek : la tuta familio tuj eklernis la lingvon. Tiam ne ekzistis Interreto ; ni uzis la perkorespondan kurson verkitan de Claude Gacond ĉe Kultura Centro Esperantista. Do ni ricevis la unuan lecionon, studis ĝin, resendis la ĉirilatan teston, ricevis la duan lecionon ktp. Plie ni ricevis klarigojn, respondojn de Claude, kaj eĉ inviton viziti KCE-n kaj CDELI-n. Tion mi

faris. Kaj Claude montris al mi ĉion en CDELI kun gvidfadeno « Japnio ». Do en ĉiu ĉambro, en ĉiu ŝranko, sur ĉiu librobreto li montris al mi ion japandevenan. Mirinda malkovro por mi ! Tio enorme nutris mian motivigon por la lernado.

## Neatendita rezulto

Komence de mia esperantostudado mi abunde krokodilis. Mi ŝatis paroli la alemanan kun germanlingvaj svisoj, la francan kun romanoj, iom la italan. Daŭre mi aŭdis de Claude Gacond : « Ne krokodilu ! Ne krokodilu ! » Ade kaj ade li diris tion, grumblis, koleris... Tio tute ne efikis, mi plu babilis nacilingve. Mi aŭdis tiun sugeston, konsilon, ordonon... sed tute ne estis obeema. Eble iom infaneca... Mi ne sekvis ĝin.

Lun tagon mi aŭdis Claude, kiu diris tute trankvile : « Kiam oni krokodilas, estas tempoperdo por la lernado... » Tiam la monpeco falis en la maŝinon kaj rezulto venis (laŭ dirmaniero alemana : *Dr Zwanziger isch abegfalle...*). Tion mi aŭdis, kaptis, komprenis, akceptis kaj sekvis. Mi ne plu krokodilas, preskaŭ ne plu...

---


## Anita Altherr

Dankon al Claude Gacond pro lia sindono al Esperanto de kiu mi dum multaj jardekoj profitis !

---



## Jean-Thierry von Büren



*Apud aŝiŝo*

### **Miaj unuaj paŝoj al esperanto**

Novembre de 1989 mi ricevis karton de Mireille Grosjean, kiu akceptis min la antaŭan tagon en KCE kun kolego de partnera lernejo en Germanio kaj gelernantoj de ambaŭ lernejoj okaze de interŝanĝa programo tiel organizita de alia koleginino de mia lernejo. La luda prezento de Mireille konvinkis min pri la valoro de esperanto.

La dua paŝo estis la perkoresponda kurso de Claude Gacond, de kiu mi resendis lecionon apenaŭ mi ricevis la korektadon kun komentarioj kaj informoj pri esperanto.

Post kelka tempo mi rimarkis, ke ne nur estas fascina la lingvo por poligloto, kiu jam eklernis la latinan kaj la helenan, sed ankaŭ la germanan, la italan kaj la rusan (kiujn mi instruas), la anglan, la hispanan, la portugalan, la polan kaj redaktis regulojn pri kompreno de la svisaj alemanaj dialektoj sur bazo de la germana lingvo, sed por esperanto ankaŭ gravas la interna ideo de toleremo kaj komprenemo inter la popoloj kaj religioj.

Mi akiris la Junulkurson de SAT kun kasedo, kaj regule lernis en ĝi. Tria paŝo estis ekskurso al Etang de la Gruère, kie Claude Gacond prezentis la apartecojn de torfejo. De la unua leciono de la perkoresponda kurso mi dediĉis ĉirkaŭ 20 lernohorojn al esperanto, kaj la klarigojn mi bone komprenis. Nun mi deziris starigi demandojn, sed mi tute ne regis la ki-vortojn. Claude pacience kaj sen tradukoj helpis min formuli miajn demandojn.

Mi retrovis fakturon de partopreno al semajnfina seminario en marto de 1990, subskribita de Mario Lépine, kun klarigoj pri uzo de ŝati, ami, emi, amori...

Grandan dankon al Claude, pere de kiu mi lernis ne nur la sistemon, sed ankaŭ la disvolviĝon kaj la etoson de esperanto !

# Nancy Fontannaz

## Claude Gacond, modelo de sindediĉo

Jam en 1982 mi renkontis Claude Gacond. Mi komencis lerni esperanton per lia perkoresponda kurso (tiam 13-leciona). Poste mi ofte partoprenis la semajnfinajn kursojn en KCE. Kun miro mi konstatis, ke ĉio disvolviĝis en esperanto, kaj mi klare memoras frazon de Claude dum manĝo : « Mankas pano ! » Tio enskribiĝis en mia kapo kiel gramatika modelo. Mi ankaŭ tre ŝatis lian instruon per bildoj sur ekrano. Dum la novjara ferio, kiu sekvis, mi vere tre ĝuis la etoson, kiun Claude inspiras, same kiel dum la ekskursoj ĉiam tre interesaj...

Mi ankoraŭ memoras pri la unua libro, kiun li konsilis al mi : *La longa vojo* de Richard Meye. Kun pacienco li respondis al miaj multaj demandoj, ĉefe instigante min malkovri mem la signifon de laŭ mi strangaj kunmetaĵoj... Dum kursoj Claude ĉiam provis kuraĝigi nin legi ĉefajn aŭtorojn. Mi memoras pri *La Litomiŝla tombejo* de Karolo Piĉ : mi estis tiel entuziasma, ke mi vizitis tiun ĉefan urbeton kun la libro enmane ! Poste mi legis pluajn librojn de Piĉ ĝuante la belan stilon !

Kiu frapis min dum tiuj lastaj jaroj, ĉefe ekde 2002, kiam mi komencis labori kun Claude en CDELI, estas lia sinteno, lia amo kaj vera respekto al ĉiuj. Lia sindonemo mirigas min. Li ne nur malavaras pri mono (li dediĉis grandajn sumojn

por KCE kaj CDELI), sed ankaŭ pri sia tempo... Ekzemple li laboras en CDELI : alvenas vizitanto. Tuj li forlasas ĉion por informi la alveninton. Sed li ne respondas rapide por repreni sian laboron : li dediĉas 2-3 horojn por plene respondi, li komunikas sian entuziasmon al la vizitanto, kiu certe ne petis tiom da klarigoj ! Mi mem ofte profitis pri tio ! Tiu sindonemo estas vere la ĉefa trajto de lia karaktero. Multfoje mi vidis lin rezigni pri siaj planoj por zorgi pri aliula peto...

Claude ankaŭ estas bonega pedagogo. Li spertis multe kun siaj lernantoj, kaj trovis metodojn por ĉiuj. Li pretigis materialon tre valoran, celante la etulojn aŭ la plenkreskulojn. Lia retejo [www.esperantogacond.ch](http://www.esperantogacond.ch) estas minejo studinda... Iom post iom ĝi proponos liajn trezorojn. Jam troviĝas multo.

Ankaŭ pro sia nekutima memorkapablo, pro la klareco de sia penso, Claude mirigas min. Li zorgas pri vere multaj intereskampoj. Lia mensso estas tute malfermita, larĝvida, radikita en la vivo mem, en la socia vivo, ankaŭ politika. Lian interesiĝon pri arto, pri vojaĝoj, pri diversaj personecoj mi laŭdas. Ankaŭ lia neŭtraleco en konfliktoj inspiras min. Neniam li akceptas kritiki iun ajn, kaj ĉiam li provas malstreĉigi la atmosferon aŭ repacigi malamikojn.

Li neniam konservis por si siajn akiraĵojn. Ĉiam li organizis ekspoziciojn aŭ prelegojn por disdoni siajn sciojn. Kaj tamen li kapablas rezervi


al si kaj al sia edzino momentojn de ripozo... Li scias ĝui la bonajn etosojn, ekzemple dum agrablaj manĝoj, promenadoj, koncertoj, prele-

goj... Li do instruis al mi multe, kaj mi esperas labori ankoraŭ longe apud li !

Dankon, Claude !

---

## Olivier Tzaut



Tio estas plezuro por mi skribi « kelkajn » vortojn pri Claude.

Mi devas unue diri kiel mi konatiĝis kun li. Estas simple : kvankam mi pasigis mian tutan junecon en Francio kun la familio, la destino volis ke mi fariĝu instruisto en elementa montara lernejo apud La Chaux-de-Fonds en 1957. La someron de tiu jaro, unu el miaj fratinoj edziniĝis kun iu Jacques Gacond en Neŭŝatelo. Kaj tiu Jacques havis tri fratojn inter kiuj iu Claude, instruisto en La Sagne, apud Ĉaudefono.

De Mont-Soleil kie mi ekinstruis mi iris viziti Claude en lia vilaĝo. Tiam li estis jam komplete transinfektita de iu agresema viruso ne tre bone konata kies nomo estis « esperanto ». Kaj, ĉar la viruso estis, kiel mi diris, tre agresema, almenaŭ por personoj ne sufiĉe fortikaj (mi estis unu el tiaj personoj) mi tre rapide

malsaniĝis kaj subfalas... Kaj tiu transinfektanto, profitante de mia malforteco, daŭre infektis min ĝis komplete venko kaj en 1973 mi partoprenis kun edzino Suzanna la konferencon de ILEI en Maribor.

Claude kaj Andrée Gacond decidis dediĉi sian tutan forton kaj sian tutan tempon al tiu neordinara infano kies nekutima nomo estis Esperanto. Kaj la rezulto estis rimarkinda. Mi devas diri, ke Claude havis la grandan ŝancon havi edzinon, kiu kunlaboras tre efike.

En 1975, kun kelkaj jurasaj gekolegoj miaj mi lanĉis la kampanjon « Esperanto en la lernejojn » por provi enkondukigi esperanton kiel elekteblan lingvon (langue à option) en la lernejojn. Malfeliĉe post unu jaro kaj duono evidentiĝis ke la financa subteno ne sufiĉis (mi tiam laboris duontempe en la lernejo kaj duontempe por esperanto) kaj ni devis agnoski, ke ni ne povis daŭrigi tiel. Mi konfesas, ke mi poste iom post iom distanciĝis de la movado... Sed mi volas diri je kia punkto ni estis tiam helpitaj de Claude, kiu estis tiam la sekretario de KCE. Sen lia helpo ni ne estus povintaj fari tion, kion ni faris (sed tie ĉi mi volas ankaŭ citi Claude Piron kies helpo



estis tiam vere esenca tra la produktado de tre trafaj tekstoj kiel « Structures linguistiques et accusatif » kaj kiel kun-prelegisto kun mi en porinstruistaj lernejoj, kie ni alparolis entuziasmajn aŭskultantarojn).



Centre culturel espérantiste  
Postiers 27  
2301 La Chaux-de-Fonds  
(Suisse)  
Tél. 039 26 74 70

Liaflanke Claude Gacond estis el-laborinta kaj pliboniganta sian rimarkindan « Programita kurso ». Samtempe li kun la edzino zorgis dum multaj jaroj pri la elsendoj en esperanto de Svisa Radio Internacia. Mi ĉiam miris pri la laborkapablo de Claude. Dum multaj jaroj li ne havis grandan dormbezonojn kaj tio ankaŭ ebligis, ke li havu gravan politikan aktivecon en la socialista partio.


Mi multfoje demandis min kiel li povis efektiviĝi tiom da laboro. Ĉar ni ne forgesu, ke li estis ankaŭ instruisto !... Mi ne laboris en la sama kantono kaj do ne havis kolegajn rilatojn (ni estus povintaj !...), sed mi scias sufiĉe pri la instruisto Claude por diri, ke oni bezonus multe da tiaj instruistoj ! Lia lasta profesia posteno estis en Ĉaudefono, kie li havis « malfacilajn » gelnantojn kaj mi kredas, ke la neŝatela instruista departemento

nur bedaŭris, ke li iun tagon fariĝis emeritulo...

Sed mi citu ankaŭ la grandegan laboron, kiun li faris por krei tiun rimarkindan institucion, kies nomo estas CDELI.

Estas tempo nun por fini. Mi ne pensis skribi tiel longe, sed kiam oni komencas paroli pri ĉio kion Claude faris sur diversaj kampoj, estas malfacile fini... Sed antaŭ ol konkludi mi ne povas lasi flanke alian gravan aspekton de la klaŭda personeco kaj tio estas lia amo por la naturo kaj por la vivo. Liaj multaj aktivecoj ne malhelpis lin kaj Andrée preni tempon por ekskursoj en la naturo, vojaĝoj, renkontiĝoj ĉiuazimutaj.

Vi havis, Claude kaj Andrée, ege riĉan vivon ! Daŭrigu tiel kaj longan vivon ankoraŭ !



*La redaktintoj deziras al ĉiuj  
agrablan festotagon.*


# Mónika Molnár

## Estis foje ...

La unuan fojon, kiam mi renkontis Claude – se mi memoras bone – mi vidis bonhumoran homon apud kamenfajro kun granda fromaĝrado en la mano, kaj tiu homo tute ne timis malpurigi siajn belajn vestaĵojn kun kravato, li fandis la fromaĝon kaj servis ĉiujn gastojn per tiu bongustega rakledo. Mi pensis, li estas bona gastiganto kaj bona kuiristo. La sekvan tagon li mirigis min per siaj botanikaj scioj dum ĵurasa ekskurso, kie li sciis la nomojn de ĉiuj plantoj

en Esperanto. Mi pensis, ho kia memorkapablo ! La plej multajn florojn mi eĉ en mia propra lingvo ne povintus nomi. Por li tio ne estas problemo.

Kaj parolante pri CDELI ? Mi estas konvinkita, ke li lernis uzi la komputilon nur por amuziĝi iom, ĉar eĉ la komputilo ne kapablas scii pli bone la riĉecojn de CDELI ol Claude mem. Desegnisto ? Jes, li estas ankaŭ desegnisto kun vera, humura talento. Por konstati tion, mi rekomendas trarigardi lian kurson de la Gaconda metodo !



Tamen, por mi, unu el liaj plej atentokaptaj trajtoj estas la historiorakontado. Mi tre ŝatas aŭskulti liajn historiojn aŭ pri famaj, konataj esperantistoj aŭ pri la CDELI-salonaj karikaturoj. Eble ne ĉiuj estus «prespretaj» pro la uzataj fraz-turnoj, sed la kleriĝo kaj la amuziĝo estas ga-

rantiitaj. Eble foje oni povus eldoni ilin sub titolo simila al « Sekretaj sonetoj-2 ». ☺ Se tio okazos, nepre informu min, ĉar mi ŝatus esti inter ĝiaj unuaj aĉetantoj ! ☺

***Belan naskiĝtagon al vi, Claude, kaj ankoraŭ longe amuzu nin per tiuj historietoj !***

# Věra Barandovská-Frank



*Věra Barandovská-Frank (\*1952), ĉeĥino, doktorino pri klasika filologio, speciale interesiĝas pri latinidaj planlingvoj. Instruas universitatnivele interlingvistikon, estas docentino de AIS San Marino kaj redaktorino de « Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft ». Adreso: Kleinenberger Weg 16, D-33100 Paderborn, barandov@mail.upb.de*

## Jubilea laŭdo por Gacondo Klaŭdo

En la sun' aŭgusta la Svisland'  
varmiĝis  
antaŭ okdek jaroj, kiam Klaŭd'  
naskiĝis.  
Neuŝatel', la bela urbo frankofona  
dum infanaj jaroj estis por li bona,  
poste al « Lernejo Homarana » iris,  
ĉar germanan lingvon studi li deziris.

Tie, en Golderno, liaj instruantoj  
frue atentigis lin pri Esperanto.  
Ankaŭ en Civila Serv' Internacia,  
kie li deĵoris dum la temp' feria,  
kaj en neuŝatela universitato  
Esperanto iĝis la prioritato.  
Kun Andrée li lernis, la  
kunstudentino,  
kiu poste iĝis lia novelzino.

Por la Esperanta Svisa Junularo,  
same kiel por la land'-edukistaro  
Klaŭd' aktivis kiel la sekretario,  
kun plezur' gvidante belajn  
skiferiojn.

Dum la renkontiĝoj, kiam li deĵoris,  
la aŭdvid-metodon li jam prilaboris,

kiu dum instruado montris sin efika  
en dumviva ago lia didaktika.  
En La Sagno lernis kun ĝoj' la  
infanoj,  
vigle korespondis kun samideanoj,  
kaj sukces' montriĝis en labor'  
persista,  
kiam klaso iĝis staĝo instruista.

Poste sin ofertis nova tuj funkcio  
de la prelegisto svisa en radio,  
kaj dum tridek jaroj kun edzino sia  
dialogis Klaŭd' en send' internacia.

Arĥivaĵojn savi iĝis la pasio,  
kiu gravis multe pli ol nur hobbio:  
Centro por Esploro kaj  
Dokumentado  
jen, rezult' de longa lia viv-agado.  
Kvantoj da valoraj arkiv'-  
dokumentoj  
pri la plej diversaj interlingv'-  
inventoj,  
verkoj kaj leteroj de la pioniroj,  
kie malkovriĝis noblaj kordeziroj  
helpi al la homoj per labor'  
senlaca,



lingvojn fari por la kompreniĝo  
paca ;  
libroj, artikoloj, aktoj kaj vortaroj,  
lernolibroj, listoj, fakaj terminaroj,  
fotoj kaj revuoj, bildoj kaj ĵurnaloj,  
ĉiuspeca aro da materialoj  
en biblioteko urba lokon trovas,  
kie Klaŭd' prizorgi lerte ilin povas.  
Por interlingvistoj veraj ja trezoroj :  
por konsulti ilin venas profesoroj  
el diversaj landoj, el la tuta mondo,  
ĝuas konsultiĝojn en la faka rondo.

La Kulturan Centron en la  
Ĉaŭdefono  
ankaŭ fondis Klaŭd' per sia propra  
mono,  
interrompis sian vojon instruistan  
pro subteni verkon nur esperantistan.

Poste li instruis daŭre duontempe  
ĝis emeritiĝo, ĉar li intertempe  
ellaboris verkon pri la didaktiko  
por la instruantoj, taŭgan en  
praktiko.

La serio « Rendevuoj didaktikaj »  
apartenis al la tekstoj plej efikaj.  
Ĉe seminarioj por la instruantoj  
en Bureso multis la partoprenantoj.

Por la svisa Esperanto-Societo  
Klaŭdo redaktoras longe jam, laŭ  
peto –  
la bulten' informas longe jam aperas,  
la novaĵojn legi ĉiuj nun esperas.

Nia Klaŭd' pro siaj agoj bonmeritaj  
apartenas jam al membroj honoritaj.

Ne nur por la svisoj, ankaŭ por  
hungaroj  
ĉiam tre utilis liaj helpaj faroj.  
Kursoj budapeŝtaj kaj la ĉaŭdefonaj  
por la pedagogoj ankaŭ estis bonaj,  
ekzamenojn freŝajn kaj  
eksperimentojn  
ILEI aprobis, laŭdis la komentojn.  
Eĉ la haga Esperanto-Instituto  
dankis por la nova ekzamenstatuto,  
UEA-honoron la samideano  
ĝuas; nu – samtempe estas li SAT-  
ano.

Krom Esperantujo montris sin efiko  
de Klaŭd' ankaŭ en kantona politiko  
kaj en neŭŝatela parlamento ŝtata  
kelkajn jarojn estis same li ŝatata.

En natursciencoj kaj geografio,  
historio kaj en arkeologio,  
en diversaj kluboj krome li aktivas,  
en kamping'-buseto dum somer' li  
vivas.

La muzik', pentrado, histori', kulturo  
interesoj estas liaj, krom naturo.

Por ke ĉiuflanke plue li aktivu,  
sane, sate, saĝe nia Klaŭd' plu vivu !  
Ĉiuj geamikoj liaj nun deziras  
vojojn nur feliĉajn, kiujn li pluiras.  
Homo saĝa, vigla, ĝoja li ja restu,  
jubileon sian kun ĝuad' li festu.  
Glason ni nun levu, sonu nia laŭdo:  
Bondezirojn korajn havu nia  
Klaŭdo !

## Festlibro Gacond 80

Kun dudeko da kontribuajoj, inter kiuj tiuj de Probal Dasgupta kaj Stefano Keller, estraranoj de UEA. Redaktita de Reinhard Haupenthal, eldonita de Iltis-Eldonejo, subvenciita de Svisa Esperanto-Societo.



Bibliothèque  
de la Ville



**De S-ro J.-A. Humair,  
Direktoro de la Urba  
Biblioteko :**  
**Antaŭparolo al la Festlibro**

*(Elfrancigis Martine Schneller)*

Estas titolo, rara : esti rekonata kiel la homo de la situacio. Tia estis, hodiaŭ, je la tempo kiam moderna pedagogio interesiĝis pri esperanto, Claude Gacond, la fondinto de Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) kaj poste de Kultura Centro Esperantista (KCE) en La Chaux-de-Fonds. Tia estas, hodiaŭ, je la tempo kiam la esperoj agnoski interlingvistikon je la internacia plano restas senŝanĝaj, Claude Gacond, ĉefaganto de CDELI, honora membro de Svisa Esperanto-Societo (SES), de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

La cirkonstancoj estis, en la jaroj sesdek, banalaj. Juna instruisto, Claude Gacond estis instigata aktive okupiĝi pri esperanto, lingvo lernita kun aliaj studentoj. Kuraĝigita pristudi en sia finstuda pedagogia laboro la rolon de esperanto en la interlerneja korespondado kaj proponi studplanon por esperanto en la elementaj lernejoj, li arigis gravan dokumentadon interlingvistikan je granda historia dimensio. Tiu ĉi integriĝos en la Urba Biblioteko en 1961 kaj konstituos la embrion de Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) fondita en 1967. Sed ĉio estis kreata kaj organizota : difini koncepton, el-

labori sliparojn, formi personaron, konstitui reton. Hodiaŭ, CDELI estas kvindek-jara, aĝo kiam oni iĝas tio, kio oni profunde estas.

Kvindek jaroj dum kiuj ĝi senĉese agadis, kun fido kaj konstanteco, por doni korpon kaj substancon al la ambicioj de sia fondinto, Claude Gacond, kaj de la esperantistoj.

Kvindek jaroj dum kiuj ĝi disvolvis, riĉigis sian dokumentan posedaĵon, kaj forpuŝis la spacojn, gajnante daŭre pli da estimo flanke de la esplorantoj, ĝis la esprimo de sia krea diverseco kaj de la specifeco de sia agado.

Kvindek jaroj dum kiuj ĝi funkciis, dank' al la volontuloj kiuj sin intersekvis, eĉ se la Biblioteko, heredanto de longa tradicio de malfermiteco, ne neglektis siajn klopodojn por garantii la necesajn kondiĉojn al la konservado kaj la valorigo de tiu interlingvistika patrimonio.

Kvindek jaroj dum kiuj ĝi klopodis aliĝi kongrue al la evoluoj de arkivista fako submetata al la akcelo de la tempo kaj de la defioj.

*Festlibro* estas, laŭdifine, kolektiva verko. Tiu verko titolita *Instrui – Dokumenti – Organizi* ne perfidas tiun tradicion. La devizo de Svislando estante : « Unu por ĉiuj, ĉiuj por unu ! », kaj Claude Gacond, al kiu estas dediĉita tiu verko, estante larĝe ilustranta la unuan parton de

tiu bela moto metinte sin je la servo de la esperantistoj, al ni konkretigi la duan.

Por realigi tian libron, necesas, je la komenco, kerno da aŭtoroj kun la sama idealo. Arigitaj ĉirkaŭ S-ino Hauptenthal, direktorino de Iltis-Eldonejo, kaj de Svisa Esperanto-Societo, la aŭtoroj, kiuj proponas al ni la sekvantajn paĝojn, elektis temojn kaj registrojn malsimilajn. Kelkaj liveras al ni sian pripenson rilate la ĉefajn demandojn koncerne interlingvistikon. Aliaj elektis elvoki la rolon de markantaj personecoj en la historio de esperanto. Aliaj, fine, emis konfidi al ni laŭ tono pli persona la motoran rolon de CDELI kaj de Claude Gacond en la esperantista movado.

Eldonante tiun verkon, S-ino Hauptenthal kaj Svisa Esperanto-

Societo deziras, okaze de la okdekjariĝo de Claude Gacond, reliefigi la dankemon, kiuj sentas la esperantistoj al tiu kiu engaĝiĝis dum ĉiuj tiuj jaroj por havigi rajton je komunikado al esperanto. Omaĝi al li, tio estas saluti lian aktivan engaĝiĝon por la kaŭzo interlingvistika kaj la konservo de ties skriba patrimonio surbaze de vivanta reto de siaj diversecoj. Omaĝi al li estas ankaŭ, kaj ĉefe, memorigi la vojon kiun li iniciatis, kaj kiu pluas en renovigita kunteksto.

Sukceso ne estintus ebla sen la kvalitoj kaj la persona engaĝiĝo de ĉiuj personoj kiuj laboris aŭ laboras en CDELI kun Claude Gacond.

Tiu *Festlibro* do estas, je la plena senco de la vortoj, vera ago de rekono kaj de dankemo.



*La Ĝenerala Kunveno de KCE ofte okazis en la leg-salono de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds. Ĉirkaŭ Claude Gacond staranta sidas Claude Piron, Olivier Tzaut, André Sandoz, prezidinto de la urbo, kaj August Braun, la KCE-prezidanto. (1975-02-16)*